

# Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

25a jarkolekto • n-ro 2 | marto-aprilo 2020

RENKONTIĜOJ PER LA RETO

Kun dokumentoj por  
la jarkunveno de  
Esperanto  
Nederland

25

Vertalers gezocht

21

Printempa  
vortserĉenigmo

20

Revuo-interŝanĝo

26

'Vi mankas al mi'

**lernu!**

25

Alvoko al tradukistoj

# Fenikso

Forumo de

## Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto  
Nederland

**ISSN 1384-6515**

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la  
gazeton.

La jara kotizo estas € 35,-

(por samdomanoj €12,50).

NEJ-anoj pagas € 15,-

(por samdomanoj € 5,-).

Fenikso estas aparte abonebla nur por ne-  
membroj en eksterlando.

La tarifo estas € 20,-.

Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version  
de Rob Moerbeek, vidu dekstre.

Redakcio:

- **Ĉefredaktoro:** Frank van Hertrooij

- **Redaktoro:** Marc Konijnenberg

✉ [redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl)

### Limdato:

Materialo por la sekva numero estas bonvena  
ĝis la 10a de junio 2020.

### Informoj pri Esperanto:

Ineke Emmelkamp

Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

([info@esperanto-nederland.nl](mailto:info@esperanto-nederland.nl))

tel.050-5718842

### Studie-weekeinde:

([studosemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studosemajnfino@esperanto-nederland.nl)).

### Esperanto Nederland enrete:

Retejo: <https://www.esperanto-nederland.nl>

Fejsbuko: [facebook.com/esperanto.nederland](https://facebook.com/esperanto.nederland)

Telegramo: <https://t.me/EsperantoNederland>

Tvitero: <https://twitter.com/esperantonl>

## Estraro

- **Estraro:** ([estraro@esperanto-nederland.nl](mailto:estraro@esperanto-nederland.nl))

- **Prezidanto:** Said Mozaffari Baluchi,  
([prezidanto@esperanto-nederland.nl](mailto:prezidanto@esperanto-nederland.nl))

tel. 06 84316394

- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp,  
Arubastraat 12, 9715 RW, Groningen  
([sekretario@esperanto-nederland.nl](mailto:sekretario@esperanto-nederland.nl))

- **Kasisto:** Loes Demmendaal,  
Duikerlaan 160, 2903 AC,  
Capelle a/d IJssel.

([kasisto@esperanto-nederland.nl](mailto:kasisto@esperanto-nederland.nl))

tel.010 2133320

- **Estrarano:** (i.a. pri instruadaj aferoj):

Rob Moerbeek,

Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE, Beverwijk.

([rob.moerbeek@esperanto-nederland.nl](mailto:rob.moerbeek@esperanto-nederland.nl))

tel.0251 231079

- **Estrarano:** Andries Hovinga,

De Fennen 47, 8918 CC,

Leeuwarden, tel.06 28916262

([andries.hovinga@esperanto-nederland.nl](mailto:andries.hovinga@esperanto-nederland.nl))

- Pri sociaj komunikiloj:

([sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl](mailto:sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl))

- **Membro-administranto:** Koos Scharroo,

Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord.

([membroj@esperanto-nederland.nl](mailto:membroj@esperanto-nederland.nl))

tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso,  
telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj  
ali)membriĝo, pagmaniero

### Bankkonto:

IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67

nome de Esperanto Nederland,

Capelle aan den IJssel.

### Eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie,

Vaartweg 24G

8382 EB

Frederiksoord

# Enhavo

- 3 Enhavo
- 4 Mallongaĵoj
- 5-11 Agadraporto
- 12 Rezultkonto
- 13 Bilanco
- 14 Budĝetproponoj
- 15 Wijzigingen Huishoudelijk Reglement
- 18+19 Beleidsplan 2020-2025
- 20 Revuo-interŝanĝo
- 21 Vortserĉenigmo
- 22 Nekrologoj
- 25 Gezocht: Vertalers
- 26+27 'Vi mankas al mi'

## La nunaj redaktoroj ĝisas

Post pli ol unu jaro da kuna prilaborado de Feniksoj, ni devis konstati ke ŝanĝoj en niaj studentaj kaj laboraj vivoj ne plu permesas al ni konstante redakti la revuon.

Ni volas danki al la legantoj kaj kontribuantoj por la ĉiama subteno, kaj al la estraro de Esperanto Nederland por la agrabla kunlaboro.

La estraro de Esperanto Nederland serĉas nova(j)n kandidato(j)n por la redakcio.

- Frank van Hertrooij & Marc Konijnenberg

## BENELUKSA KONGRESO EN CHARLEROI

*okazos 17 - 20 septembro 2020*

Ni denove planas diversnivelajn kursojn, altnivelajn prelegojn, prezentojn, libroservon de FEL kaj Eldonejo Libera, ekskursoj ktp. La luksa kongresejo troviĝas tuj apud la stacidomo de Charleroi Sud; ege praktika estas tio!

Plentempe, de ĵaŭdo ĝis dimanĉo inkl. loĝadon kaj manĝojn: 235 EUR.

Unutaga partopreno kun tagmanĝo kaj vespermanĝo: 50 EUR.

Eblas partatempe partopreni. Diversaj ebloj kaj aldonoj aperas en la retejo. Bonvenon!

Retejo: [www.benelukso.eu](http://www.benelukso.eu)

gasteja retejo: <https://www.lesaubergesdejeunesse.be/charleroi>

## Jarkunveno 2020 kaj Kultura Tago prokrastitaj

Kun bedaŭro ni devas informi la membrojn ke la Jarkunveno, julia studsemajnfino kaj la Kultura Tago estis prokrastitaj pro la kronviroza pandemio. La estraro sciigos kiam estos decido pri la novaj datoj.

## Novaj membroj en 2020

Du novajn membrojn ni akceptas:

Alfred Halberstadt el Nieuwegein kaj Jeremy Juist el Benningbroek.

Ambaŭ aliĝis al la venonta studsemajnfino!

Raportas: **Ineke Emmelkamp**, sekretario

## La sorto de la nederlanda IJK

La Internacia Junulara Kongreso 2020 ne okazos en Nederlando, sed ĝi okazos tutmonde! La diversaj limigoj pri kunvenoj kaj vojaĝado ni organizos tute retan IJK-on. Ĝi okazos ĉirkaŭ la sama semajno (11-18 julio), kaj ni preparas por ĝi enhavon ĝueblan de ĉie ajn, kie en la mondo vi estas. La baza kotizo estos 20 eŭroj.

Nuntempe ni multe laboras malantaŭ la kulisoj pri la ekzaktaj formo, datoj kaj la retpaĝo.

Raportas: **la organiza teamo de IJK 2020**

## Reago al la alvoko

In de vorige Fenikso toonde ik een circa 90 jaar oude champagneflles met een Esperanto-etiket en vroeg naar informatie over mijn opa A.J. Jansen, geboren 27-10-1891, die lang geleden Esperantist was.

Daarop kwam een leuke reactie van esperantist Kees Ruig uit Malden, samengevat als volgt:

*Uw opa heeft in 1926 samen met de Esperantisten A. van Weerhorst (vz.), H. de Lepper (penningm.), A. van Straaten (cursusleider), J. Alberda (v-vz.) en L. Kwak (commissaris) in Nijmegen de Centra Esperanto-Propaganda Komisiono opgericht met het doel een schriftelijke Esperantocursus uit te brengen. Uw grootvader was secretaris van deze Commissie. Deze cursus zag het daglicht in 1927 en werd op slag beroemd, want het was met 3.000 – 4.000 cursisten per jaar de grootste cursus ooit. De cursus bestond uit 26 wekelijkse lessen, die uitzonderlijk mooi waren uitgevoerd. Vanaf 1930 werd de cursus ondersteund door radio-uitzendingen.*

*Het succes van de cursus was mede te danken aan de toenmalige crisis en het feit dat de arbeiders mondiger wilden worden ("proletariërs aller landen, vereenigt U!") en in het Esperanto het middel vonden internationale contacten te leggen. In Amsterdam werd toen o.a. een cursus aangeboden voor vijf cent (f 0,05!). In 2004 werd in een televisie-uitzending over de geschiedenis van het Esperanto deze cursus nog aangehaald.*

In 2004, vertelde meneer Ruig verder, had hij enkele malen lerse accordeonmuziek gespeeld met een dame. Hij had haar verteld dat hij ook had gespeeld op het Universala Kongreso in Vilnius, Litouwen. 'Oh', had ze geantwoord, 'mijn opa was Esperantist en heeft indertijd een Esperantocursus in Nijmegen opgezet'. Ze kende zelfs nog enkele Esperanto-woorden. Meneer Ruig veronderstelde dat die mevrouw een zus van mij moet zijn geweest. Maar het was (en is) een nicht van mij...

Raportas: **Leo Eijkhout**

## Kion fari en tiu ĉi kronviroza tempo?

Novaĵo! Per la speciala paĝo ĉe Eventa Servo, [www.eventaservo.org/reta](http://www.eventaservo.org/reta), eblas ekhavi superrigardon de kunvenoj, kiuj okazas per interreto. Iuj kluboj uzas Zoom, aliaj Jitsi Meet aŭ Skype. Foje necesas antaŭanonci por ricevi la kodon, foje aperas la enrakodoj kaj eblas tuj aliĝi. Multaj esperantistoj tion faras nuntempe: komence de aprilo aperis en Eventa Servo pli ol 50 tiaj kunvenoj!

Mi ĉeestis retajn kunvenojn de Herzberg, Irana Kongreso, La Amsterdama Rondo.

Vi simple povas resti hejme kaj partopreni al internaciaj kunvenoj.

UEA invitas esperantistojn aliĝi al la virtuala **Poliglota Kunveno**, kiu okazos 29-31 majo, kaj estas sponsorita de nia Asocio: [polyglotgathering.com/2020](http://polyglotgathering.com/2020)

El novaĵletero verkita de: **Ineke Emmelkamp**

## Informoj pri la jarkunveno:

En tiu ĉi Fenikso vi trovas la raportojn kiujn ni kutime pritraktas en la jarkunveno.

Pro la tutmonda koronavirusa krizo ni devis nuligi la kunvenon. Ne eblas kunveni, ne eblas vojaĝi al la kunveno, bedaŭrinde.

Jarkunveno gravas por asocio, sed nun pli gravas la sano kaj bonfarto de niaj membroj. Kiam ni pli bone konas la situacion rilate kunvenoj kaj socia distanco, ni planos novan kunvenon.

Tamen ni decidis publikigi ĉiujn dokumentojn. Ne eblas diskuti nun pri la diversaj dokumentoj. Kelkaj povas atendi, aliaj ne.

La oficiala agadplano (Beleidsplan - Activiteiten van Esperanto Nederland voor de komende jaren) gravas.

Ĉu vi havas demandojn pri ĝi post legado? Sendu ilin al la sekretario. Kaj ni preparolos ilin. Tuj poste ni povas publikigi ĝin en nia retejo, kun la mencio ke en venonta jarkunveno ni oficiale akceptas ĝin kun eventualaj ŝanĝoj kaj/aŭ aldonoj.

Fartu bone.

Ineke Emmelkamp, sekretario  
[sekretario@esperanto-nederland.nl](mailto:sekretario@esperanto-nederland.nl)

# Agadraporto de Esperanto Nederland pri 2019



## 1.1. Banko/kapitalo

Esperanto Nederland havis malprofiton en 2019 de € 6.615. La ĉefa kialo estas nia kontribuo por la Amsterdama Katedro, € 3.000.

La antaŭvidita ricevota legaco de € 5.000 daŭre ne atingis nin.

La propra kapitalo de la asocio estis je 31a de decembro 2019: € 96.997

La malprofito estas 6,3 % (inkl. la kontribuon por la katedro) de la propra kapitalo en 31a de decembro 2018.

La malprofito estas 3,4 % (ekskl. la kontribuon por la katedro) de la propra kapitalo en 31a de decembro 2018.

*Raportas Loes Demmendaal*

## 2.1. Estraro

La estraro konsistis en 2019 el:

- Said Baluĉi, prezidanto ĝis 2019. Li estis reelektita en la membrokunveno 2019 por trijara periodo
- Loes Demmendaal, kasisto ĝis 2019. Ŝi estis reelektita en la membrokunveno. por trijara periodo.
- Andries Hovinga, membro ĝis 2019. Li estis reelektita en la membrokunveno 2019 por trijara periodo
- Ineke Emmelkamp, sekretario, estis elektita en la membrokunveno 2019 por dujara periodo.
- Rob Moerbeek, membro, restis en la estraro. Li estas estrarano ĝis 2021.
- Pieter Engwirda forlasis la estraron en la printempo 2019.

La estraro kunvenis 5 fojojn.

- La 166a kunveno: 19-01-2019, en la Centra Oficejo, Rotterdam.
- La 167a kunveno: 09-03-2019, en la Centra Oficejo, Rotterdam.
- La 168a kunveno: 31-08-2019, en De Kardagoor, Utrecht.
- La 169a kunveno: 02-09-2019, en De Kardagoor, Utrecht.
- La 170a kunveno: 14-12-2019, en De Kardagoor, Utrecht.

Rob Groeneveld ĉeestis la estrarkunsidojn kaj faris la raportojn.

Foppe-Klaas Hovinga kaj Korine Cheizoo ĉeestis kelkajn estrarajn kunsidojn.

### 2.1.1 Privacybeleid Esperanto Nederland

La teksto troviĝas en la retejo de Esperanto Nederland.

## 2.2. Komerca Ĉambro

La asocio estas oficiale registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Amsterdamo. La registriĝo estas senpaga.

## 2.3 Membrokunveno

La 28-a ĝenerala kunveno okazis la 25an de majo 2018 en la Centra Oficejo en Rotterdam.

### 2.3.1 Membroj kaj "Vrienden van Esperanto Nederland":

La administradon de membroj kaj 'vrienden' prizorgas Koos Scharroo. Li sendas bonvenigan paketon al novaj membroj kaj amikoj, disponigas aktualan adresaron al la ekspedisto, kiu dissendas Fenikson, kaj li informas la estraron kaj redakcianojn de Fenikso pri ŝanĝoj en la membraro. Laŭmende li havigas publikan membroliston

<b>Membroadministrado pri la jaro 2019</b>			
situacio 1-1-2019		199	
novaj membroj		15	
malaliĝoj	7		
forpasoj	4		
situacio 31-12-2019		203	
aĝoj			
<30-jaraj		6	3%
30- ĝis inkl. 69- jaraj		86	42%
>70jaraj		108	53%
sen mencio de aĝo		3	1,50%
<b>Vrienden van Esperanto Nederland</b>			
situacio 1/1/2019			13
situacio 31/12/2019			0

La estraro decidis ne plu daŭrigi la kategorion 'Vrienden'. La 'amikoj' estas informitaj. Du el ili fariĝis membro.  
*Raportas Koos Scharroo*

#### **2.4. Arkivo Esperanto Nederland**

Respondecas pri la kontakto: Ans Bakker-ten Hagen.

IISG (Internationaal Instituut voor Sociale Geschiedenis) estas la Instituto kiu prizorgas la arkivojn kiujn ni prezentas tie. En la jaro 2019 ni ne aldonis novajn valoraĵojn.

Pro kunlaboro kun la Biblioteko Hector Hodler (en la Centra Oficejo de UEA) kaj kun la estro de la Libro-Servo, Ionel Onet, kelkfoje ni donis (mal)novajn librojn. La oficisto ĉe UEA decidis ĉu temas pri ekzemplero kiu aldoniĝu al la biblioteko aŭ ke ĝi estu vendota brokantaĵo.

Ĉiam indas atentigi la asocion Esperanto Nederland pri Esperantaĵoj kiujn oni emas forĵeti, ne konsciante pri eventuala historia valoro.

*Raportas Ans Bakker-ten Hagen*

#### **2.5. Biblioteko Universitato Amsterdam**

La Universitato de Amsterdam (UvA) mastrumas la bibliotekon de Esperanto Nederland. Siatempe la asocio povis aĉeti la librojn, kiuj aperis en la serio Ludovikito (Zamenhof). Tiu riĉigo de nia biblioteko okazis dank'al heredaĵo tiucele. Intertempe aperis pliaj eldonoj en tiu serio sed ni ne aldonis. En la raportjaro nenio ŝanĝiĝis rilate al nia posedo en la Biblioteko ĉe UvA.

*Raportas Ans Bakker-ten Hagen*

#### **3.1. Kaskontrolo**

La kaskontrol-komisiono en 2019 konsistis el Rudi Koot kaj Jeannette Bosse, rezervo estis Simon Smits.

#### **3.2. Arbitracia komisiono**

La komisiono konsistas el Marc van Oostendorp (2017-2020), Anneke Schouten-Buijs (2016-2019), Johan Swenker (2017-2020).

En la jarkunveno Anneke Schouten-Buijs estis reelektita por nova periodo de tri jaroj (2019-2022). En la jaro 2019 ne necesis agi.

### 3.3. Verloren van Themaatpremio

La ĵurio decidis ke pri 2018 la Verloren van Themaat-premio aljuĝiĝis al Andries Hovinga kaj Ineke Emmelkamp pro ilia laboro dum la lingva festivalo 'Lân fan taal'.

*Raportas Loes Demmendaal*

### 4.1. Informado

En 2019 mi daŭrigis mian laboron por trakti informpetojn, kiuj plej ofte venis per la reto. Mi forsendis 74 kovertojn kun informmaterialo (en 2018: 56). Kelkaj homoj partoprenis en studsemajnfino. Al membroj mi plurfoje sendis informmaterialon, kiun ili deziras uzi dum informado en budo aŭ biblioteko. Kun plenplena kofro de informmaterialo mi iris al la Drongo-festivalo en Nijmegen. Esperanto Nederland posedas du grandajn starantajn informilojn, faritajn de Terry Vogelaar kaj Ineke Emmelkamp. Membroj povas prunti ilin.

Dum la Universala Kongreso en Lahti mi prizorgis la budon en la Movada Foiro, kie asocioj povas prezenti sin.

*Raportas Ineke Emmelkamp*

### 4.2 Drongo talenfestival (lingvo-festivalo) 2019

La 25an kaj la 26an de novembro 2019 Esperanto Nederland denove havis informbudon en la DRONGO talenfestival (lingvo-festivalo) en Nijmegen. Ni havis bonan lokon sufiĉe proksime de la enirejo. Pluraj Esperantistoj el Nederlando kaj Belgio helpis pri la informado. Ni parolis kun multaj interesiĝantoj. Estis sukcesa evento. Ni disdonis demandaron al vizitintoj, ili povis respondi al pluraj demandoj. La premio estis senpaga partopreno al studsemajnfino. Tiu kiu gajnis la premion venis al la studsemajnfino de novembro 2019.

*Raportas Andries Hovinga*

## 5. Instruado

La estrarano Rob Moerbeek respondecas pri tiu fako. Vidu punkton 10.

### 5.1 Katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo.

Je la 1a de februaro 2019 komenciĝis la dua mandato de la katedrulo. La Esperanto- kaj Interlingvistiko-klasoj de la akademia jaro 2018-19 okazis en la dua semestro (feb-mar). La du grupoj estis komplete sendependaj, alivorte neniu el ili jam sekvis la alian klason antaŭe. La Esperanto- klasanoj multe aprezis la novan lernolibron Amikaro, kiu estas la rezulto de multjara sperto instrui Esperanton al universitataj studentoj, en Nederlando kaj Italio. Ĉiuj gestudentoj aktive partoprenas la gastleciojn de prof-ro d-ro Davide Astori de la Universitato de Parmo danke al la interŝanĝo Erasmus+ inter la du universitatoj. Ankaŭ la katedrulo donis gastlecionon en Parmo sed ne nur. Unue, la UvA-studenta asocio VOX invitis la katedrulon gastlecioni pri Esperanto en ĝia finjara evento en junio. Due, li prelegis en Malago (Hispanio) kadre de la Hispana Esperanto-Kongreso pri la Amsterdama Katedro mem kaj pri la lingvopolitikaj flankefikoj de (ebla) Briteliro laŭ invito de HEF. La dua prelego spekteblas en Jutubo.

Trie, okazis gastprelego en Bratislavo ĉe *Polyglot Gathering*, laŭ invito de la skipo E@I, kiu portis al nova interŝanĝo Erasmus+ kun la loka Universitato de Ekonomiko kaj partopreno al tiea internacia semajno. Kvare, la katedrulo instruis tipologion de la planlingvoj en internacia doktora somerlernejo en la Universitato de Pavio. Fine, li prelegis pri planlingvoj unufoje en la Universitato Venecio Ca' Foscari kaj dufoje en la Libera Universitato de Berlino, laŭ invitoj de prof-ro d-ro Elisabetta Ragagnin, turkologino kaj fakulo pri la mongola lingvo kaj kulturo. La dua fojo en Berlino rimarkindas pro la granda partopreno de la evento (ĉ. 200 aŭskultantoj): fakte, krom la katedrulo kiel Esperanto- ĉampiono, por tiel diri, gastlecionis spertulino pri la angla kiel lingvafrankao kaj spertulo pri Per- Aŭtomata Tradukado; ĉio okazis en Esperanto, la germana kaj la angla. La Esperanto-Ateliero en mezlernejo Montessori en Milano daŭris ĝis la fino de la akademia jaro – t.e. junio 2019. Fine, la katedrulo regule instruis la supernivelan kurson pri literaturo kaj kulturo Esperanta kadre de la studsemajnfinoj organizitaj de Esperanto Nederland en Krikkenhaar.

*Studentoj kiuj ekzameniĝis*

Akademia jaro	Interlingvistiko	Esperanto
2018-19	7	7

Eltiro por Esperanto Nederland; la samaj informoj aperos en la kompleta Jarraporto por la kuratorio

*Raportas la katedrulo prof-o d-ro Federico Gobbo*

## 5.2 Studosemajnfinoj

Arjen-Sjoerd de Vries, Lilian van der Burgt kaj Ineke Emmelkamp estis la organizantoj. Marieke de Haas asistis en la kuirejo.

Okazis du studosemajnfinoj en 2019: ambaŭ en la NIVON-ejo Krikkenhaar (Bornerbroek). La ejo tre taŭgas por organizi studosemajnfinojn. Ni sukcesas aranĝi tie kvin kursoĉambrojn por instrui al la kvin diversaj grupoj. En ambaŭ renkontiĝoj aperis novaj vizaĝoj.

Al la marta kunveno partoprenis 35 personoj. Instruis Ĵeremi Bert-Manoppings, Roel Haveman, Fransuaz Pellegrin-Balza, Lode Van de Velde kaj Federico Gobbo.

Al la novembro renkontiĝo aliĝis 36 homoj. Unu partoprenanto gajnis la premion en konkurso dum la Drongo-festivalo. Li senpage povis partopreni! Instruis Yves Nevelsteen, Said Baluĉi, Fransuaz Pellegrin, Federico Gobbo kaj Bert de Wit.

Fine de 2019 ni povis anonci ke la unua studosemajnfino en 2020 okazos la 3an, 4an kaj 5an de julio, denove en la NIVON-ejo Krikkenhaar. La preparoj komenciĝis. Pluraj aliĝiloj jam alvenis.

*Raportis Ineke Emmelkamp.*

## 6. Fenikso

De Fenikso en 2019 aperis kvin numeroj. Presado kaj forsendado estas faritaj de FEL/Antverpeno.

Marc Konijnenberg kaj Frank van Hertrooij estas la redaktoroj de Fenikso

*Raportis Marc Konijnenberg*

## 7. Interreto

### 7.1. Retejo Esperanto Nederland

En la jaro 2019 okazis multaj grandegaj atakoj kontraŭ la retejo, kaj ankaŭ multfoja misuzado de niaj retpoŝtaj formularoj (spamo).

La atakoj kontraŭ la retejo venas de Irano, kaj surbaze de ip-adresoj, ankaŭ de registaraj instancoj. Kialo povus esti la deveno juda de Zamenhof aŭ la irana deveno de nia prezidanto. Tial ni interkonsentis kun Saïd forigi de la retejo lian privatan adreson. Ĝis nun oni ne sukcesis la retejon difekti.

La retpoŝta misuzado venas de ĉiuj kontinentoj, pro kio ĉiuj spamfiltriloj de esperanto-nederland.nl funkcias rigore. Konsilo: kontroli la retpoŝtkeston de nedezirataj reklampoŝtaĵoj (spambox) ĉu okazis misaranĝoj.

*Raportas la retejestro Frans Schild*

### 7.2 Sociaj komunikiloj

La sociaj komunikiloj de Esperanto Nederland konsistas el:

- Facebook, Twitter kaj Youtube kanalo.

Mi diskonigis preskaŭ ĉiutage novaĵojn pri la asocio Esperanto Nederland, diversajn informojn rilate al Esperanto en Nederlando kaj esperantistoj el Nederlando en la mondo. Ni anoncis kaj raportis, ofte dulingve, pri okazaĵoj.

La afiŝoj de fejsbuko kaj tvitero estas videblaj ankaŭ en fenestro (plugin) en la ĉefa retpaĝo de la retejo de Esperanto Nederland.

Kunlaboris: Ineke Emmelkamp, Andries Hovinga kaj Joost Franssen:

*Raportas Andries Hovinga*

## 8. Universala Esperanto Asocio (UEA)

Mi ĉeestis la komitatkunsidojn dum Universala Kongreso, kiu okazis en Lahti (Finnlando).

Mi voĉdonis por la nova estraro de UEA.

Mi estis alelektita al la komisiono pri statutoj de landaj kaj fakaj asocioj, kaj en tiu komisiono ni estas traktantaj la aliĝpeton de Teamanta Esperantista Organizo (TEO).

*Raportas Marc Konijnenberg, komitatano A por Nederlando*

## 9. Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)

La EEU-komisiono daŭrigis sian laboron dum tiu ĉi jaro. Mi regule ricevis la informilojn, kiujn mi transsendas al la estraro kaj redakcio de Fenikso. Mi ne povis ĉeesti la kunvenojn kiuj okazis dum la Itala Kongreso.

*Raportas Ineke Emmelkamp*



## **10. Faka sekcio NGGE - Nederlanda Grupo de Geinstruistoj Esperantistaj**

NGGE post la forpaso de la Honora Membro Mila van der Horst restas kun 11 membroj, inkl. interesiĝantojn. La estraro (prez. R.Moerbeek, protokolanto Simon Smits, kiu ankaŭ sekretarias, kasistas kaj redaktas 3 n-rojn de "NGGE Sciigas") atendas pli junan asiston. Krom jarkunveno kun lingva kaj kultura posttagmezo okazis Studotago, i.a. pri kanada literaturo kaj la evitendaĵoj kaj arkaikaĵoj el PIV, por kiuj en la ILEI-kongreso ni fondis laborgrupeton. (listo pretiĝis jan. '20). Nia kotizo inkluzivas membrecon en ILEI. "Sciigas" aboneblas por 10 eŭroj. Pluraj el niaj membroj, i.a. nia Honora Membro Wil van Ganswijk, instruas rete (skribe aŭ skajpe), ĉeeste, i.a. en la kursosemajnfinoj. Por la ILEI-statistiko ni kolektadas informojn pri ĉies Esperanto-instruado.

*Raportas Rob Moerbeek*

## **11. Regionaj sekcioj**

### **11.1 Sekcio Alkmaar**

La estraro konsistas el Tiny Droge, prezidanto kaj Margot Koopmans, vic-prezidanto; ili demisios en 2020. La kasisto estas John Droge, kiu demisiis en 2019, sed reelektiĝis. La estraro kunvenis 5 fojojn Ni kunvenis en la kvartaldomo de Alkenhorst, en la salono Kiekendief. Meznombro de partoprenantoj estas 12 personoj.. Ni kunvenis 10 fojojn. Nia klubo havas 20 membrojn.

Nia ĥoro Malvo konsistas el 9 membroj, inkluzive la direktistino Marijke Lathouwers.

La Fromaĝokloŝo aperis 3 fojojn, prizorgita de Vinus Lathouwers. Ni sendis nian klubrevuon al novaj gastoj de studsemajnfinoj.

*Raportis Margot Koopmans*

### **11.2 Esperanto Klubo Eindhoven**

Je la fino de 2019 ni havis 14 membrojn. Meznombro de 10 vizitis niajn klubvesperojn. La klubo kunvenis 10 fojojn, en "De Uitwijk". En julio kaj aŭgusto ni ne kunvenis.

Dum la klubvesperoj ni ludis skrablon; per ekranaj bildoj ĉiuj rakontis pri travivaĵoj; pri la temo Poemoj kaj Poezio ĉiuj parolis. La temo Antikvaĵoj estis interesaj: ĉiuj kunportis ilojn kaj eksplikis la utilon. Iu prizorgis kelkajn aŭskultajn testojn kaj la temo Zamenhof ankaŭ donis ideon al ĉiuj.

Ĉiu membro mem elektas la monaton en kiu oni prizorgas la programon.

En majo TRE-EGE, la grupo el Essen/Bochum invitis nin por ekskurso al la fama fervora Münsterner Brücke en la valo de la rivero Wupper sude de Solingen. Ni promenis tra la valo al kastelo Burg kaj havis gvidadon tra la kastelo.

En aŭgusto nia klubo organizis por ili ekskurson al Limburgo, matene ni havis gvidadon en la misiamuzeo en Tegelen kaj posttagmeze ni vizitis la Keramiko-muzeon "Tiendschuur" en Tegelen.

Klubanoj partoprenis aliajn eksterlandajn aranĝojn, i.a.: la Beneluksan Kongreson en Charleroi, Belgio kaj 'Luminesk' en Germanio

*Raportas Jeannette Bosse*

### **11.3 Esperanto-klubo Helmond**

Ekde januaro 2019 la klubo Helmond ne plu ekzistas.

*Raportis Ralph Schmeits*

### **11.4 Sekcio Noord-Nederland**

La 31an de decembro 2019 ni havis 24 membrojn en la tri nordaj provincoj, unu honoran membron. Ok homoj abonis nian bultenon 'La Verda Stelo', kiu pro manko de tempo kaj homforto ne aperis. La prezidanto/sekretario de la klubo estas Ineke Emmelkamp. Richard Hofman prizorgas la financojn. Johan Swenker pretas daŭrigi la organizadon de informbudoj. Gonda Kruijer prizorgas la gratulservon.

En 2019 la klubo 14 fojojn kunvenis en la Drees-apartamentaro ĵaŭdvespere. Averaĝe 6 personoj partoprenis. Ni kune tradukis interesan turisman libreton pri la urbo Groningen. Wiebren Akkerman prizorgis la eldonon. Aliaj temoj estis: ludo de la 'Granda Vojaĝo', kiun Lode Van de Velde eldonis kaj ludo por konstrui frazojn helpe de diversaj bildoj.

Smaranda prizorgis interesajn tradukojn de kelkaj kantoj de Stef Bos, ekz. 'Estas tempo por ekvivi'. Dum la somero estis 3 eblecoj kune trinki kafon! Dum unu ni biciklis al la bela ĝardeno 'De drie wilgen' en Harkstede, kun multaj plantoj kaj lageto. Membroj partoprenis al diversaj Esperanto-kongresoj kaj al la studsemajnfinoj.

*Raportas Ineke Emmelkamp*

### 11.5 Esperantoklubo Zamenhof, Nijmegen.

En 2019 Klubo Zamenhof havis dormantan staton. La ĉefa kialo estas ke inter la ok membroj estas pluraj, kiuj pro la alta aĝo ne plu kapablas (pli granddistance) vojaĝi. La estraro estas dupersona: Theo Peters, kasisto; Jan Bemelmans, prezidanto kaj sekretario  
*Raportas Jan Bemelmans, prezidanto*

### 11.6 Sekcio Haarlem

En la fino de 2019 la sekcio Haarlem havis 11 membrojn kaj 4 donacantojn.

Entute ni kunvenis 17 fojojn en la hejmo de Tanja van Huis. Ŝi ĉiam gastame akceptas nin en sia hejmo en ĵaŭdaj posttagmezoj.

La 28an de februaro okazis la jarkunveno. Tanja restas prezidantino kaj kasistino kaj Bert de Wit sekretario de la sekcio.

Dum la kunvenoj la membroj parolis pri diversaj aferoj, i.a. pri la Universala Kongreso de Esperanto en Lahtio kaj aliaj internaciaj kongresoj. Oni ankaŭ provis solvi enigmojn el la libro "Intelektaj Amuzoj".

Kelkfoje Baukje paroligis nin pri iu temo. Bedaŭrinde ŝia sanstato nun ne plu permesas al ŝi viziti la sekciajn kunvenojn.

En la retejo de Esperanto Nederland troviĝas la PDF pri Harlema tra la jarcentoj:

<https://esperanto-nederland.nl/esp/turista-informo/Harlema%20tra%20la%20jarcentoj.pdf>

Tiun priskribon ni uzis ankaŭ por la informado de gastoj eksterlandaj kiuj venis el Pollando kaj Usono en oktobro kaj kiuj restadis ĉe Bert. La usona s-rino kun sia filo vizitis ankaŭ Tanja van Huis. Ŝi, de rusa origino, tre interesiĝis pri la familia historio de Tanja.

Vizitis nin en septembro Ans Bakker el Amsterdamo.

Bedaŭrinde la Harlema biblioteko ne plu organizas foiron por kursoj en septembro. Tial ni reklamis por kurso en loka semajna gazeto. Sen rezulto.

En la lunda posttagmezo okazas kurso por progresantoj kun Jan van Dijk kiel kursano. La instrumaterialo estis el la libro "Averto pri Murdo" de Julian Modest kaj poste el "Paŝoj al plena posedo" de William Auld. Kun la aliaj kursanoj (en lunda vespero) ni legas la krimromanon "Solenaj Matenoj", ankaŭ de Julian Modest, pri kiu la lernantoj respondas demandojn.

Bert de Wit instruis dum semajnfina kurso en Krikkenhaar en novembro

*Raportas Bert de Wit*

### 11.7 La Amsterdama Rondo

La kunvenoj de la Amsterdama Rondo okazas en la dua dimanĉo de la monato en Hotel De Koopermoolen en Warmoesstraat, proksime de centra stacidomo. La kunveno komenciĝas je la 13a kaj daŭras ĝis la 15a h.; poste oni povas laŭplaĉe lunĉi en restoracio apuda. La plejparto de la ĉeestantoj (inter 10 kaj 20) ne venas el Amsterdamo, sed el aliaj lokoj.

En 2019 ni kunvenis 11 fojojn (ne en aŭgusto). En januaro Johan van der Hoek prezentis la muzeon Neeltje Pauw, kiu troviĝas en Beemster. Ni aŭdis pri la historio kaj vidis la memoraĵojn pri pasintaj tempoj. En februaro Leston Buell parolis pri komputilado en Esperanto, i.a. pri la fakaj terminoj kiujn ni ĉiutage uzas. Profesoro Federico Gobbo parolis en marto pri "La amsterdama katedro post kvin jaroj: nuntempaj vojoj al interlingvistiko". Kvizon prezentis Bert de Wit en aprilo. La kvizo estis jam prezentita de An Olieslagers dum la jarfina renkontiĝo Luminesk' en Germanio. "La plej saĝa homo" estis Arjen-Sjoerd De Vries. Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge informis la ĉeestantojn en la junia kunveno pri sia projekto de "kunpaŝado" (sponsorado de geesperantistoj kiuj kunmarŝis dum la Nimega Kvartaga Marŝado). Ĉar la somera periodo jam komenciĝis en julio, ni priparolis Esperanto- aranĝojn dum la somero. Kiujn vi plej ŝatas?

Clément Baleyte, kiu laboris en la CO en Roterdamo, venis en septembro por paroli pri TEJO. Cetere en novembro Rogier Huurman informis nin pri la venonta Internacia Junulara Kongreso en Someren, Nederlando, de la 11a-18a de julio 2020. Bert de Wit montris bildojn de sia ĝardenvojaĝo en okcidenta Anglio sub la titolo "Tipe Angla" kaj aliaj ĉeestantoj parolis pri tipe polaj, beneluksaj kaj similaj spertoj. Kiel kutime, ni ankaŭ parolis pri la libroj kiujn ni legis. Tio okazis en decembro 2019.

Cetere, la purigistino en De Koopermoolen interesiĝas tre pri Esperanto. Ŝi diras ke ŝi povas kompreni multon de tio kion oni diras..

*Raportas Bert de Wit*

## **12. Tutlandaj aranĝoj 12.1 Rompo de kodoj, Zamenhofprojekto**

En majo 2018, pola komponisto kaj muzikteatristo, Jerzy Bielski, sendis leteron al la ĝenerala direktoro de UEA kaj petis lian helpon por fari muzikteatron pri Zamenhof kaj Esperanto. Jerzy skribis ke li mem devenas de la sama urbo de Zamenhof; Bialistoko kaj interesas lin la problemo de (mis)komunikado inter popoloj. En sia muzikteatro li planis montri diversnaciajn solistojn kiuj parolis en siaj propraj lingvoj. Esperanto laŭ la scenaro devus esti reala solvo inter malsamlingvanoj.

UEA ne havis eblecon helpi en tiu ĉi projekto. Ili petis min serĉi helpon inter Nederlandaj Esperantistoj. Mi skribis al Esperanto Nederland, TEJO, NEJ kaj kelkaj aliaj. Finfine multaj Esperantistoj helpis. Bert de Wit kaj Francisco Veuthey kaj mi mem en julio 2018 kunsidis kun Jerzy por vidi kiel ni povos helpi lin. Ineke Emmelkamp tradukis afiŝon, Andries Hovinga zorgis informadon en sociaj komunikiloj, volontuloj de TEJO kaj NEJ partoprenis la busekskurson al Moresnet (Kelmis). Do, ne mankis esperantistoj. En 2019 Bielski prizorgis du prezentojn, en Utrecht kaj en Kelmis/Moresnet kaj unu en januaro 2020 en Amsterdam. Lin subtenis finance nederlandaj organizoj kiel: Gaudeamus Foundation, Podiumkunsten, Amsterdamse Bostheater, Muziekhuis Utrecht.

*Raportis Said Baluĉi*

## **12.2 Kultura Tago**

Estraranoj kun helpo de Korine Cheizoo kaj Bert de Wit komencis la preparojn por la Kultura Tago, kiu okazintus la 28an de marto 2020.

## **12.3 Monumento Bergen op Zoom**

La monumento troviĝas apud mezlernejo, la Roncalli-lernejo. Pro ilia jarfina projekto pri "Renkontiĝoj" mezlernejoj de la unua jaro vizitis la monumenton en tri grupoj kaj aŭskultis klarigojn. La organizanta instruisto diris poste "Nun minimume 75 mezlernejoj almenaŭ ekscias pri la signifo de la monumento, kiun ili ĝis hieraŭ ĉiam preterpasadis sen konscio pri ĝia signifo aŭ la lingvo Esperanto". Kontentiga rezulto. Ĉiu grupo ricevis teknon kun informmaterialo kaj ĉiu lernanto ricevis paĝan montrilon!

*Raportas Korine Cheizoo*

*Kompilis: Ineke Emmelkamp, aprilo 2020*

# Rezultkonto 2019

No.	Rezultkonto 2019
-----	------------------

Enspezoj:

1.1.1	Rentumo
2.2.1	Kotizoj
2.2.2	Donacoj
	Legaco
	Aliaj enspezoj (komisiaj vendoj ktp)

Sumoj enspezoj:

Elspezoj:

1.1.2	Bankkostoj
2.1.1	Estraraj kostoj
2.1.2	Reprezentado
2.3	Membroj (kunvenoj)
2.3.1	Kostoj membroadministrado
2.4	Arkivo (IISG)
3.3	Verloren van Themaatpremio
4.1	Informado Ĝenerale
4.2.2	Katedro UvA - Fiksaj kostoj
4.2.4	Studsemajnfino saldo
4.2.5	Junuloj (KKPS ktp)
4.4	Fenikso
4.5.1	Retejo Esperanto Nederland
5.1	UEA (Aligitaj membroj)
5.2	EEU (Kotizoj)
5.3	Komitatano-A (UEA)
5.4	Reprezentanto ĉe EEU
6.2	Mabesoone (Regionaj agadoj)
6.3	Landaj renkontiĝoj
7,1	Ne-atenditaj aferoj + div. elspezoj

Sumoj elspezoj:

Deficito
----------

Buĝeto 2019	Realigita 2019
50	64
6.000	6.158
1.300	728
PM	0
100	110
<b>7.450</b>	<b>7.060</b>

180	173
1.000	1.204
100	0
500	474
150	130
1.000	1.000
250	250
2.300	2.474
3.000	3.000
600	-226
200	0
4.000	3.240
98	272
176	176
199	199
1.000	958
150	0
500	151
1.000	0
200	200
<b>16.603</b>	<b>13.675</b>

<b>9.153</b>	<b>6.615</b>
--------------	--------------

# Bilancio 2019

## Bilancio Esperanto Nederland 31-12-2019

<b>Aktivoj</b>	
Antaŭpagitaj kostoj	456,80
ASN Konto	103.347,02
Triodos kuranta	7.165,66
Triodos rendement	532,37
UEA konto	89,01
<b>Sumo de la aktivoj</b>	<b>111.590,86</b>

<b>Pasivoj</b>	
Kapitalo je 1-1-2019	103.611,88
Deficito	6.614,86
Kapitalo je 31-12-2019	96.997,02
Kreditoroj	3.193,24
Kotizoj 2020	510,00
Studsemajnfino 2020	225,00
Kultura tago 2020	25,00
Katedro Amsterdam 2019-2023	10.462,00
(Subvencio) membreco UEA	178,60
	<b>111.590,86</b>

## Katedro Amsterdam 2019 - 2023

Enspezoj 2017	6.176
Enspezoj 2018	4.594
Enspezoj 2019	4.454
Elspezoj 2019	-4.762
	10.462
<b>En 2019 donacis:</b>	
Ans Bakker - ten Hagen	
Loes Demmendaal	
Hans Erasmus	
Johan van de Hoek	
Tanja Huis	
Miny Massar	
Rob Moerbeek	
Melanie Mueller	
Baukje Muizelaar	
Bert de Wit	

# Budĝetproponoj

No.	Buĝet/Laborplano 2020 kaj 2021
-----	--------------------------------

Enspezoj:

1.1.1	Rentumo
2.2.1	Kotizoj
2.2.2	Donacoj
	Legaco
	Aliaj enspezoj (komisiaj vendoj ktp)

Sumoj enspezoj:

Elspezoj:

1.1.2	Bankkostoj
2.1.1	Estraraj kostoj
2.1.2	Reprezentado
2.3	Membroj (kunvenoj)
2.3.1	Kostoj membroadministrado
2.4	Arkivo (IISG)
3.3	Verloren van Themaatpremio
4.1	Informado Ĝenerale
4.2.2	Katedro UvA - Fiksaj kostoj
4.2.4	Studsemajnfino saldo
4.2.5	Junuloj (KKPS ktp)
4.4	Fenikso
4.5.1	Retejo Esperanto Nederland
5.1	UEA (Aligitaj membroj)
5.2	EEU (Kotizoj)
5.3	Komitatano-A (UEA)
5.4	Reprezentanto ĉe EEU
6.2	Mabesoone (Regionaj agadoj)
6.3	Landaj renkontiĝoj
7,1	Ne-atenditaj aferoj + div. elspezoj
	Sumoj elspezoj:

Realigita 2019	Propono Buĝeto 2020	Propono Buĝeto 2021
64	10	0
6.158	6.000	6.000
728	750	750
0	PM	PM
110	80	80
<b>7.060</b>	<b>6.840</b>	<b>6.830</b>
173	180	180
1.204	1.200	1.200
0	100	100
474	500	500
130	120	120
1.000	1.000	1.000
250	250	250
2.474	2.300	2.300
3.000	3.000	3.000
-226	200	200
0	200	200
3.240	3.500	3.500
272	200	200
176	148	148
199	202	0
958	1.000	1.000
0	150	0
151	350	350
0	1.000	1.000
200	200	200
<b>13.675</b>	<b>15.800</b>	<b>15.448</b>

Deficito		<b>6.615</b>	<b>8.960</b>	<b>8.618</b>
----------	--	--------------	--------------	--------------

# Voorgestelde wijzigingen

## Wijzigingen in het Huishoudelijk Reglement

### Huidig artikel:

Artikel 1

1. Naast leden als omschreven in Artikel 7 lid 1 van de Statuten kent de vereniging ondersteunende leden, donateurs en vrienden genaamd.
2. Donateurs of vrienden betalen een jaarlijkse een vrijwillige bijdrage.
3. Donateurs of vrienden ontvangen niet het verenigingsblad, maar wel de Nederlandstalige informatie per e-mail.
4. Donateurs of vrienden hebben toegang tot ledenvergaderingen, waaronder de algemene vergadering, maar hebben geen stemrecht.

### Voorgestelde wijziging:

Artikel 1

1. Naast leden als omschreven in Artikel 7 lid 1 van de Statuten kent de vereniging eventueel donateurs.
2. Donateurs betalen een vrijwillige bijdrage.
3. Donateurs ontvangen niet het verenigingsblad.
4. Donateurs hebben toegang tot ledenvergaderingen, waaronder de algemene vergadering, maar hebben geen stemrecht

### Huidig artikel:

Artikel 4

Het dagelijks bestuur wordt gevormd door de voorzitter, de secretaris en de penningmeester. Zij treden volgens rooster af:

1. penningmeester, 2. voorzitter, 3. secretaris.

De bestuurswisseling vindt plaats na de verkiezing in het nieuwe bestuur.

Bij tussentijds aftreden van een bestuurslid neemt de opvolger diens plaats in in het rooster van aftreden.

De overdracht van de bescheiden vindt plaats binnen 1 maand na de bestuurswisseling. Het verenigingsbestuur vergadert zo dikwijls als dit nodig is, alsmede indien 3 bestuursleden een vergadering wensen.

### Voorgestelde wijziging:

Artikel 4

Het dagelijks bestuur wordt gevormd door de voorzitter, de secretaris en de penningmeester.

Zij treden volgens rooster af:

1. voorzitter, 2. secretaris, 3. penningmeester.

De bestuurswisseling vindt plaats na de verkiezing in het nieuwe bestuur.

Bij tussentijds aftreden van een bestuurslid neemt de opvolger diens plaats in in het rooster van aftreden.

De overdracht van de bescheiden vindt plaats binnen 1 maand na de bestuurswisseling. Het verenigingsbestuur vergadert zo dikwijls als dit nodig is, alsmede indien 3 bestuursleden een vergadering wensen.

**Toelichting op de wijziging:** Deze volgorde van aftreden is logischer. Bovendien komt dit overeen met de huidige stand van zaken in het bestuur. De voorzitter treedt af in 2020, de secretaris in 2021 en de penningmeester in 2022.

### **Huidig artikel:**

Artikel 6

De penningmeester stelt een staat van baten en lasten van de vereniging op, alsmede een begroting voor het komende begrotingsjaar.

De secretaris stelt een jaarverslag van de activiteiten van de vereniging op, en maakt een resumé van de verslagen van werkgroepen, afdelingen en vakgroepen.

Het bestuur stelt een activiteitenplan voor het komend jaar op. De boekendienst en de bestuurscommissies stellen jaarlijks een staat van baten en lasten op evenals een activiteitenplan voor het komende jaar. De ledenadministratie doet verslag van de stand van het ledenaantal. Alle verslagen dienen binnen 3 maanden na afloop van het verenigingsjaar beschikbaar te zijn.

Alle leden hebben recht op toezending van de jaarverslagen.

### **Voorgestelde wijziging:**

Artikel 6

De penningmeester stelt een staat van baten en lasten van de vereniging op, alsmede een balans, een (eventueel gewijzigde) begroting voor het lopende jaar en een begroting voor het komende begrotingsjaar.

De secretaris stelt een jaarverslag van de activiteiten van de vereniging op, en maakt een resumé van de verslagen van werkgroepen, afdelingen en vakgroepen.

Het bestuur stelt een activiteitenplan voor het komend jaar op.

De ledenadministratie doet verslag van de stand van het ledenaantal.

Alle verslagen dienen binnen 3 maanden na afloop van het verenigingsjaar beschikbaar te zijn.

Alle leden hebben recht op toezending van de jaarverslagen.

### **Huidig artikel:**

Artikel 7

